# LA EPISTOLO ĜENERALA DE JUDAS

1 Judas, servisto de Jesuo Kristo kaj frato de Jakobo, al la alvokitoj, amataj en
Dio, la Patro, kaj konservitaj por Jesuo Kristo: 2 Kompato al vi kaj paco kaj
amo pligrandiĝu.

3 Amataj, kiam mi faris ĉian diligentecon, por skribi al vi pri nia komuna
savo, mi deviĝis skribi al vi, por kuraĝigi vin batali por la kredo, jam per unu
fojo transdonita al la sanktuloj. 4 Ĉar enŝteliĝis iuj homoj, jam antaŭ longe
destinitaj por ĉi tiu kondamno, malpiuloj, ŝanĝante la gracon de Dio en
diboĉecon, kaj malkonfesante la solan Estron kaj nian Sinjoron Jesuo Kristo.

5 Mi do volas rememorigi vin, kvankam vi jam per unu fojo sciiĝis pri ĉio, ke
la Sinjoro, savinte popolon el la Egipta lando, poste pereigis la nekredantojn.
6 Kaj anĝelojn, kiuj ne konservis sian regadon, sed forlasis sian propran
loĝejon, Li rezervis sub mallumo en katenoj ĉiamaj ĝis la juĝo en la granda
tago. 7 Kiel ankaŭ Sodom kaj Gomora kaj la ĉirkaŭaj urboj tiel same, kiel ĉi
tiuj, malĉastiĝinte kaj foririnte post fremdan karnon, estas elmontritaj kiel
ekzemplo, suferante la punon de eterna fajro. 8 Tamen tiel same ankaŭ ĉi
tiuj en siaj sonĝadoj malpurigas la karnon, malestimas aŭtoritaton, kaj
insultas honorojn. 9 Sed Miĥael, la ĉefanĝelo, kiam en kontraŭstaro al la
diablo li disputis pri la korpo de Moseo, ne kuraĝis lin akuzi insulte, sed diris:
La Sinjoro vin riproĉu. 10 Sed tiuj insultas ja ĉion, kion ili ne scias; sed kion ili
per naturo komprenas, kiel la bestoj senprudentaj, en tio ili malvirtiĝas. 11
Ve al ili! ĉar ili iris sur la vojo de Kain, kaj forĵetis sin en la eraron de Bileam
por dungopago, kaj pereis en la kontraŭdirado de Koraĥ. 12 Ili estas la
subakvaj rokoj en viaj agapoj, kun vi kunfestenante, sentime sin paŝtante;
nuboj senakvaj, per vento disportataj; aŭtunaj arboj senfruktaj, dufoje
mortintaj, elradikigitaj; 13 sovaĝaj marondoj, elŝaŭmantaj siajn hontindaĵojn;
steloj vagantaj, por kiuj la nigreco de mallumo por eterne estas rezervata.
14 Kaj al ili ankaŭ Ĥanoĥ, la sepa post Adam, profetis, dirante: Jen la Sinjoro
venis kun Siaj sanktaj miriadoj, 15 por fari juĝon kontraŭ ĉiuj, kaj por
kondamni ĉiujn malpiulojn pri ĉiuj malpiaĵoj, kiujn ili malpie faris, kaj pri ĉiuj
obstinaj paroloj, kiujn malpiaj pekuloj parolis kontraŭ Li. 16 Ili estas
murmuremuloj, plendemuloj, irantaj laŭ siaj voluptoj (dum ilia buŝo parolas
fanfaronaĵojn) kaj favorantaj personojn pro profito.

17 Sed vi, amataj, memoru la dirojn antaŭe parolitajn de la apostoloj de nia
Sinjoro Jesuo Kristo; 18 nome, ke ili diris al vi: En la lasta tempo estos
mokemuloj, irantaj laŭ siaj propraj voluptoj malpiaj. 19 Tiuj estas la
apartigantoj, laŭsentaj, ne havantaj la Spiriton. 20 Sed vi, amataj,

konstruante vin sur via plej sankta fido, preĝante en la Sankta Spirito, 21
konservu vin en la amo al Dio, atendante la kompaton de nia Sinjoro Jesuo
Kristo por eterna vivo.  22 Kaj unujn, kiuj ŝanceliĝas, indulgu; 23 kaj unujn
savu, eltirante ilin el la fajro; kaj aliajn kompatu kun timo; malamante eĉ la
veston makulitan de la karno.

24 Kaj al Tiu, kiu povas vin gardi senfalaj, kaj starigi vin senriproĉaj antaŭ Sia
gloro en granda ĝojo, 25 al la sola Dio, nia Savanto, per Jesuo Kristo, nia
Sinjoro, estu gloro, majesto, potenco, kaj aŭtoritato, antaŭ ĉiu mondaĝo, kaj
nun, kaj ĝis la eterneco. Amen.